

# Antaŭparolo

## 70 jaroj de CED, kiajn ŝanĝojn alfrontis la mondaj lingvo-problemoj intertempe?

En 1952, CED estis fondita de Ivo Lapenna por antaŭenigi la sciencan studon de Esperanto kaj ties diversaj aplikoj en ĉiuj vivosferoj. La sinteno, kiu tiam orientis CED estis ke la lingva diverseco de la mondo konsistigis barilon kiu malfaciligis internacian komunikadon. Konsekvence, se estis ununura mondlingva problemo, ni klopodu trovi ununuran solvon. Pro tio, la tiama nomo de CED estis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kies ununura lingvo-problemo havus kiel eblan solvon la ampleksan akcepton de Esperanto.

Tamen, tiu sinteno ŝanĝiĝis inter interlingvistoj en la 1970-aj jaroj. La kreskanta uzado de hegemoniaj lingvoj (kiel la angla) en internacia komunikado, la sciencoj kaj edukado (inter aliaj spacoj) evidentigis aliajn problemojn, kie ne-denaskaj parolantoj de la koncerna hegemonia lingvo (aŭ denaskaj parolantoj kiu parolis malpli laŭnorman formon de ĝi) suferis lingvan diskriminacion.

Parte dank' al la kreskado de lingvopolitiko kiel studkampo, fariĝis ĉiam pli evidenta, ke ekzistas ne nur unu, sed pluraj mondlingvaj problemoj. De baroj kiuj malfaciligas internacian komunikadon ĝis lingva imperiismo, lingva diskriminacio kaj subpremo al minoritataj lingvoj, tiuj pluraj temoj postulis pli ol unu iniciaton kaj lingvopolitikon. Tiam, plurlingvismo iĝis parto de la solvo: subteni minoritatajn lingvojn ne signifas plifortigi barojn al internacia interkompreniĝo, sed konservi la homan riĉecon, kiu kongruus kun ne-hegemonia lingvo komune uzata kaj ne-imperiisma. Tiamaniere Esperanto iĝis ne plu ununura solvo al ununura problemo, sed helpilo por interkompreniĝo kaj konservado de la lingva kaj kultura diverseco de la mondo. Tial CED estis renomigita en la 1970-aj jaroj, kaj ĝia nuna nomo – Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj – respegulas ĉi tiun ŝanĝon kiu karakterizas la nuntempan agadon de CED.

Ĉi tiu numero de *Esperantologio / Esperanto Studies* markas la 70-jariĝon de CED, kiu okazis en 2022. La artikoloj kiuj malfermas ĉi tiun numeron estis verkitaj surbaze de kelkaj el la prelegoj kiuj festis ĉi tiun daton dum la 44-a Esperantologia Konferenco, en la Université du Québec à Montréal (UQAM), en Kanado. La unua artikolo, de Mark Fettes, pritraktas la agadojn de CED tra la 20a jarcento, emfazante kiel CED utiligas siajn revuojn, konferencojn kaj subvencian programon por kontraŭbatali misinformadon pri planlingvoj kaj por antaŭenigi lingvan justecon kaj lingvajn rajtojn en mondskalaj lingvopolitikoj. Sekve, la artikolo de Sabine Fiedler rakontas la sukcesan sperton de la aŭtoro pri la emplektiĝo de interlingvistikaj temoj en kursoj por studentoj de diversaj fakaj fonoj en ŝia universitato en Germanio. Surbaze de tio, Fiedler argumentas por la uzado de Esperanto kaj planlin-

gvoj pli ĝenerale kiel maniero aliri fakajn debatojn pri internacia komuni- kado kaj lingva justeco. La sekva artikolo, de Grant Goodall, rekonstruas la rilatojn inter planlingvoj kaj lingvistiko tra la 20a jarcento. Goodall rakontas ke, dum Esperanto kaj lingvistiko formiĝis pli malpli samtempe, plurfoje vidiĝis kaj amikaj kaj malamikaj sintenoj inter esperantistoj kaj lingvistoj ĉirkaŭ la akcepto de planlingvoj.

Post ĉi tiuj artikoloj kiuj konsistigas la omaĝon de EES al la 70-jariĝo de CED, venas kontribuoj kiuj aliras aliajn interlingvistikajn temojn. Patrice Haggin aliras al la efiko de la Dreyfus-afero, kiu multe influis la historion de Francio samkiel la historion de Esperanto en la frua 20a jarcento, dum la tiel nomata “franca periodo” en la historio de ĉi tiu lingvo. Sekve, Klaus Schubert esploras, laŭ kritika aliro al la skalo de Detlev Blanke, kiu planlin- gvo estis la unua vere funkcia planlingvo. Pere de analizoj pri Volapük, Solresol kaj la Lengua Universal de Sotos Ochando, Schubert montras kiel kelkaj el tiuj lingvoj preparis la grundon por la sekvaj. Sekve, la esplora noto de Otto Prytz aliras polemikan demandon: ĉu Esperanto estas seksis- ma lingvo? Prytz esploras la premisojn de Esperanto kompare al tiuj de aliaj lingvoj por sin demandi je kiu grado eblas ke seksismo estu eco de lingvo.

Ĉi tiu numero de EES ankaŭ inkluzivas recenzojn de la jenaj libroj: *The MIME Vademecum: Mobility and Inclusion in Multilingual Europe*, redaktita de François Grin kaj aliaj (recenzita de KIMURA Goro Christoph); *Antaŭ Unu Jarcento: La Granda Milito kaj Esperanto*, redaktita de Javier Alcalde kaj José Salguero (recenzita de Carlo Minnaja); *Uncertainty in Deliberate Lexical Interventions. Exploring Esperanto Speakers’ Opinions through Corpora*, de Mé- lanie Maradan (recenzita de Christopher Gledhill); *Esperanto and Languages of Internationalism in Revolutionary Russia*, de Brigid O’Keeffe (recenzita de Ulrich Lins); *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando: surkampa esploro pri la esperantaj identecoj*, de Irene Caligaris (recenzita de Alessio Giordano); *Igengokan komyunikesyon no hoho: baikaigengo wo meguru giron to zissai*, de KI- MURA Goro Christoph (recenzita de GOTOO Hitosi); kaj *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*, de Sabine Fiedler kaj Cyril Brosch (recen- zita de Ida Stria).

Laste, ni profitas la okazon por anonci ke, por respreguli la internacian kaj plurfakan orientiĝon de EES, ekde ĉi tiu numero la revuo adoptas la referenc-stilon Ĉikago aŭtoro-dato (Chicago author-date, el *Chicago Manual of Style 17th Edition*). Malgraŭ sia titolo, la Ĉikago-stilo estas uzata en fakaj publikaĵoj en pluraj landoj kaj sud- kaj nord-planedaj, kaj estas ankaŭ uzata de diversaj fakoj. Tiamaniere, ke ĝi estos pli alirebla al / konataj de niaj eventualaj kontribuantoj ol la referenc-stilo antaŭe adoptita de EES.

Ni esperas ke ĉi tiu numero de EES respregulu kelkajn aspektojn de la ampleksa agado de CED ekde sia fondo ĝis la nuntempo, kaj ke la artikoloj kiuj sekvas ĉi tiun antaŭparolon levu fruktodonajn demandojn pri la nuna kaj estonta stato de Esperantologio kaj Interlingvistiko.

Ĝuu la legadon!

Guilherme Fians kaj Klaus Schubert